# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2017**


## PREZENTITA "LA CALLE ZAMENHOF" EN MADRIDO

La 20an de junio en madrido estis prezentita al la ĝenerala publiko la libro "La calle Zamenhof", traduko en la hispanan lingvon de "La Zamenhof-strato". Temas pri dialogo de la pola ĵurnalisto Roman Dobrzyński kun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo de D-ro L. L. Zamenhof, en kiu ambaŭ pritraktas la vivon de la avo kaj nepo kaj la historiajn cirkonstancojn kiujn ambaŭ travivis, krom diversajn konsiderojn kaj ideojn pri Esperanto kaj la mondo ĝenerale.





La libro estis eldonita de la eldonejo Certeza kun la kunlaboro de Hispana Esperanto-Federacio. La prezentado okazis en la institucio "Casa Sefarad", en la palaco de Cañete. Ĝin enkondukis la direktoroj de la Casa Sefarad, Miguel de Lucas, kaj de la Pola Instituto en Madrido, Mirosława Kubas-Paradowska. Poste la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prezentis la aŭtoron kaj la verkon, kaj Roman Dobrzyński rakontis pri la cirkonstancoj de la verkado kaj aliaj travivaĵoj.

La veno de Roman okazis danke al la kunlaboro de la Pola Instituto pri Kulturo, kiu akceptis lin en kolokvo kun polaj loĝantoj en Madrido la 19an de junio. Krome, Roman prezentis la libron ankaŭ en Zaragozo kaj poste dum la Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo.

## KONGRESA PREZENTO EN MADRIDO

Kiel ni anoncis en la pasinta numero, HEF kaj MEL organizis prezentadon en Madrido de la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Teruelo inter la 23a kaj 25a de junio.



La prezentado okazis la 21an de junio en la sidejo de la "Casa de Aragón" (Domo de Aragono), en la placo República Argentina, de Madrido. Ĝin enkondukis ties prezidanto, José María Ortí. Poste, paroladis la Ĝenerala Direktoro pri Kulturo de la Registaro de Aragono, Nacho Escuín, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, J.A. del Barrio, kaj la prezidanto de la Loka Organiza Komitato de la kongreso, Alberto Granados.

Sekve, Miguel Fernández montris du premierajn okazaĵojn rilatajn al la kongreso: la libron "La defio vivi kaj krei", de Fernando J. López, kaj la

poemon al la Geamantoj de Teruelo, prezentotan en Teruelo, kiun li deklamis Esperante, kun posta hispana versio deklamita de Ana Manero. Poste, Martin Wiese prezentis du kantojn kiel antaŭgustumon al sia koncerto en Teruelo. Je la fino, MEL regalis la ĉeestantojn per modesta invito.

Krome, dum la tuta tago estis muntita informa tablo en la placo República Argentina, por disdoni informojn, kiun atentis la junuloj Alex kaj Sophie.

Entute 17 madridanoj partoprenis la Kongreson en Teruelo, el inter pli ol 150 ĉeestantoj.

## VIZITIS NIN

La 11an de junio venis al Madrido Orlando Raola, kubandevena veterana esperantisto, nun loĝanta en Usono kaj prezidanto de Esperanto-USA. Dum la mateno li rendevuis kun Ana Manero por pritrakti aferojn rilatajn al bibliotekoj, kaj poste kunmanĝis kun pluraj esperantistoj en proksima restoracio kaj iom promenis la urbon.

Pro la hispana kongreso venis al Madrido kelkaj eksterlandaj samideanoj. Inter ili, krom la menciita Martin Wiese, niaj amikoj de la podkasto *Varsovia Vento*, Irek Bobrzak kaj Agnieszka Mozer.

Okaze de la semajno pri festado por gejaj rajtoj, vizitis la urbon kelkaj amikoj el Francio, Nicolas, Frédéric kaj Éric. Diversaj madridaj esperantistoj rendevuis kun ili la ĵaŭdon 29an kaj la vendredon 30an de junio.

## KONGRESOJ EN 2018

Estis konfirmite en la lastaj tagoj ke du gravaj kongresoj okazos en Madrido en julio 2018. La 77a Hispana Kongreso de Esperanto okazos inter la 20-a kaj 22-a de julio, invitite de MEL. La Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) disvolviĝos inter la 21-a kaj 28-a de la sama monato profitante ke la Universala Kongreso okazos en Lisbono fine de julio kaj komence de aŭgusto tiujare.

Komence de venonta septembro oni kunvokos kunvenon de madridanoj por formi la definitivan Organizan Komitaton de ambaŭ renkontoj. Ĉiu kunlaboro estos bonvena.

## POEMARO AĈETEBLA ĈE MEL

MEL havas por disvendo kelkajn ekzemplerojn de la dulingva poemaro "Ni iras, vidas", de Mª Ángeles Maeso. Prezo: 10 €. Vi ŝparos afrankon se vi akiras ĝin persone en la sidejo.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos lunde, post la 18,30, sed atentu ke pro la someraj ferioj oni ne certigas la malfermon dum ĉiuj lundoj. Do, se vi intencas viziti la sidejon, estas prudente certiĝi antaŭ ol alveni.

Krome, ankaŭ ne okazos la unuasabataj renkontoj, ĝis septembro. Tamen, oni rendevuos okaze de vizitoj de gastoj, aŭ por profiti la bonan veteron. Do, por esti informitaj pri ĉio ĉi, indas plu viziti regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com